

Johann Wolfgang von Goethe,

Ĉe rivero

tradukita de Manfredo Ratislavo

Disfluu, kantoj vi, por ĉiam,
Karegaj, mi forgesu vin!
Vin knab' ne kantu rave iam
Kaj ne dum florsezon' knabin'.

Por karulino nur kantitaj
Vi estis, nun mokanta min.
En akvo estis vi skribitaj,
La akvo forfluigu vin.

*Traduko de la Germana poemo "Am Flusse" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1994-07-12.*

MR-271-1 / Arg-263-530 (2004-09-06 08:30:43)